

Peter Huchel,
Sovaĝa kaŝtano

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĝi ne manĝeblas, sed ĝi knalas,
se oni enfajrigas ĝin;
aŭtune, kiam ĝi defalas,
infanoj por ĝi klinas sin.
Ĝi pendas en pikila ŝelo,
tro fore por malgranda man',
ŝirmite sub folia stelo,
ne povas pluki ĝin infan'.

Sed kiam en aŭtun-vetero
ŝtorm' skuas arbojn ĝis kulmin',
kaj araneoj tra l' aero
de l' vento forportigas sin,
eksaltas pilkoj de kaŝtano
de ĉiuj branĉoj de l' ale',
pelite de la venta mano
ruliĝas jen sur la ŝose'.

*Traduko de la Germana poemo "Wilde Kastanie" de PETER HUCHEL (*1903-04-03 - †1981-04-30) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2004-06-02.*

MR-420-1a / Arg-284-578 (2005-02-12 23:29:16)